


# PONTO ☆

*Jaro 3 N-ro 2 (16)    Organo de Sunda Esperanto Agado aprilo 2004*

## La 6-a SEA-kunsido

okazis la 6-an de marto 2004 en Helsingborg.
Ĉeestis: Ann-Louise Åkerlund, Barbro Haraldsson, Jill Hilford, Helga Holmgren el Helsingborg, Jytte Sunekaer, Ileana Schrøder kaj Arne Casper el Kopenhago, Anna-Maria Lange el Lund, Sten Svenonius kaj Karin Lindquist el Malmö.
Ann-Louise Åkerlund gvidis la kunsidon kaj Karin Lindquist notis.

### 1. Raportoj

Retpaĝo: Sten havos eblecon pere de sia laboro aĉeti servolokon je modesta prezo. Dum la printempo Johan pretigos la retpaĝojn. Grave estas ke oni ĉiam aktualigu la retpaĝojn. La kluboj sendas siajn materialojn/ŝanĝojn al persono, kiu tuj enmetu ilin en la respektivan paĝon.
La proponita kurso de Daniel alterne Malmö/Kopenhago ankoraŭ ne okazis pro ne sufiĉe da partoprenantoj. Oni laboros por realigi ĝin.

**2. Ponto** bone funkcias dank´ al bona kunlaboro inter la materialdonantoj kaj materialakceptanto. Ĉar ni decidis eldoni Ponto-n 6-foje jare okazos ke ĝi kelkfoje plipaĝiĝos.

### 3. Agado.

Ni decidis enmeti adresojn de retkursoj en Ponto. Listo de kursoj aranĝotaj diversloke estos kunmetita.
Esperantokurso en CD-rom de Flandra Esperanto Ligo aĉeteblas en Kopenhago.
Sten proponis ke ni provu aranĝi ekskursojn en nia SEA-regiono ”Studrondo ĉirkaŭ la Sundo”. La intenco estas ke ni unufoje jare renkontiĝu diversloke por studi pri nia regiono aŭ elektu alian temon laŭplaĉe. La celo estas ke ĉiuj partoprenantoj kontribuu.
Kunlige kun tio ni faru rondvojaĝon en la ĉirkaŭaĵo. Ni komencos en Helsingborg la 13-an de junio. Vidu la inviton de la klubo en Helsingborg, kie la unua renkontiĝo okazos.

La Dana Esperanto Asocio aranĝos kursojn en diversaj niveloj 4-5/09 kaj 11-12/09 ĉe Anna kaj Erik, Ruds Vedby.

La jaro 2006 KEM festos sian 100-jariĝon. Kaŭze de tiu la kluba estraro proponis inviti SEF, kiu ankaŭ celebros 100 jarojn, kaj DEA, nia plej proksima najbaro trans la Sundo.

**La venonta SEA-kunsido okazos la 2-an de oktobro en Kopenhago**.

## Klubo Esperantista de Helsingborg

festis sian 70-jaran datrevon la 21-an de marto. Referato de la amuza festo en la venonta n-o de Ponto

## Sunda Esperanto Agado kore gratulas



DANIEL GRANELLO
kiu estis elektita kiel prezidanto en SEJU antaŭ nelonge.

Daniel estas tre aktiva ankaŭ en **SUNDAJ JUNULOJ** kaj en Esperanta Klubo de Lund

Nästa **Ponto**, nr 3
utkommer ca 11 juni.
Skicka allt material till
*Karin Lindquist*
senast den 22 maj

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/*redakta komitato:*
**Kontaktperson**: *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20
Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Helen Claesson (desegnaĵoj), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado), Gertrud Lund.


ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 75 N-ro 2 (685)* >>Ĉiam antaŭen<<

Fondita en 1906


**Tagordo 12.05**

1. Elekto de protokolkontrolanto
2. Diskuto kaj decido pri aŭtunaj kursoj
3. Diskuto kaj decido pri aŭtunaj programeroj
4. Eventualaj demandoj

## Jarkunsido de KEM 18.02

La prezidanto Sten Svenonius bonvensalutis la membrojn al la jarkunsido. Nia honora membro Olle Olsson estis memorita per silenta minuto. La prezidanto laŭtlegis la jar- kaj ekonomian raportojn pri 2003 kaj Evert Rausek laŭtlegis la raporton de la revizoroj. Ĉio estis aprobita. La elektitaj estraranoj kaj diversaj funkciuloj estas notitaj sube.

### Elektoj dum la jarkunsido:

Prezidanto Sten Svenonius por unu jaro
Estraranoj Per-Olov Johansson kaj Karin Rylander 2004-2005
Anstataŭanto Anders Rylander 2004-2005
Revizoroj Evert Rausek kaj Ulla Ullfors
Anstataŭantoj Agneta Lund kaj Asta Schaedel
Studkomitato Sten Svenonius (sekretario) kaj Kjell Persson
Informa komitato Per-Olov Johansson (sekretario), Agneta Lund, Alf Mobark kaj Albert Vel
Programkomitato Gerd Rodén (sekretario), Gertrud Lund kaj Asta Schaedel
Redakcio por Ponto
Karin Lindquist (sekretario), Sten Svenonius, Gertrud Lund, teknikaj aferoj Per-Olov Johansson, Ulla Ullfors kaj Albert Vel.
Respondeca pri la hejmpaĝo de SEA Johan Svenonius
Biblioteko kaj arĥivo Åke Palm
Bild- kaj fotoaferoj Alf Mobark kaj Per-Olov Johansson
Komputilaj aferoj Johan Svenonius
Gazeteltondantoj Skånska Dagbladet Albert Vel, Sydsvenska Dagbladet Karin Rylander Ystads Allehanda Ulla Ullfors
Kolektanto kaj gluanto de eltondaĵoj Per-Olov Johansson
Prizorganto de la klubejo Evert Rausek
Komitato por la printempa festo 17.4:
Karin Rylander (kunvokanto), Maria Rebeggiani kaj Per-Olov Johansson
Kafkomitatoj printempe 2004:
13 /1 Per-Olov Johansson kaj Gerd Rodén
4/2 Gertrud Lund
18/2 Karin Rylander
3/3 Per-Olov Johansson
17/3 Karin Lindquist
31/3 Karin Rylander
28/4 Karin Lindquist
12/5 Elsy Lindblom-Vel kaj Albert Vel
Elektoprepara komitato
Per-Olov Johansson (kunvokanto) kaj Ulla Ullfors

La estraro mem elektos oficialan reprezentanton ĉe la jarkunsidoj de SEF kaj Eldona Societo Esperanto. Kiel vojaĝkontribuon la delegito ĉe la jarkunsidoj ricevos 75% de la plej malmultekosta bileto.

La jaro 2006 KEM festos sian 100-jariĝon. Kaŭze de tiu la estraro proponis inviti SEF, kiu ankaŭ celebros 100 jarojn, kaj DEA. Ebla loko estus Kvarnby Popolaltlernejo. Oni proponis tri "ruĝajn" tagojn printempe. La jarkunsido akceptis la proponon. Al Sten estas komisiita kontakti SEF kaj DEA.

Okaze de la jarkunsido de SEF kaj la artikolo de Bengt Nordlöf en La Espero, ni decidis diskuti pri nia landa asocio kaj KEM en nia klubo la 31-an de marto kaj pro tio ni nuligis la jam menciitan programon.

Karin Lindquist

Donaco al Olle Olsson:



Gerd Rodén


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius sten@agado.net*
☏ 040-19 14 77


### Migrado sur Azoroj

La rakonto de Agneta Lund pri migrado sur la Azoraj insuloj vere allogis la membrojn de Malmö kaj Helsingborg. Ŝi kaj ŝia amikino Gunilla migris sur la insulo Sao Miguel, kiu estas la plej granda .

Ili kune kun la 15-nombra grupo migris dum unu semajno, supren kaj malsupren en treege montara naturo ĉirkaŭ 10 kilometrojn ĉiutage kaj ofte mem pretigis siajn manĝaĵojn en la naturo.

Azoroj situas 1500 km okcidente de Portugalio. La grundo estas plejparte vulkana kaj ankaŭ nun siblas kaj fumas sur la insuloj.

Ĉirkaŭ meze de 1450 kapitano Diogo de Silva eltrovis Azorojn kaj multaj el la enloĝantoj havas rektan parencecon kun la praloĝantaro.

Azoroj havas aŭtonomian staton al Portugalio. La loĝantoj vivas de fiŝkaptado, terkulturado, bredado de brutoj .

Ĉar la turistvojaĝoj al la insuloj kreskis dum la lastaj jaroj la vivkondiĉioj por la homoj pliboniĝis.

Agneta montris multajn bildojn, en kiuj oni vere povas vidi la mirinde belan naturon. Multaj el ni supiras fari saman vojaĝon – eble iom pli malstreĉan!

Karin Lindquist

# Kontaktilo

*Membrogazeto de K.E.K*
*Konversacia Esperantista Klubo*
*Kopenhago*
N-ro 2 (655) aprilo 2004 68-a jaro



**Kara leganto**

Ni havis tre bonan SEA-kunvenon en Helsingborg. La raporton vi vidas frontpaĝe.
– La vintra kurssezono finiĝis. Ni dankas al Amir, Jacob, Bent J., Arne kaj Zita pro seninterrompa kaj agrabla instruado. La studgrupo Lene kaj Bent W. prizorgis ankaŭ kontentige. Pro la konstrulaboro ni havis problemojn funkciigi la retbabilejon. Sed nia salono fariĝis tiom bele lumigita, ke ni pli facile povas legi la malgrandajn literojn en *Vojaĝo en Esperanto-lando.* Kunvenoj okazas principe ĉiujn labortagojn lundojn. Komuna manĝado la unuan lundon de la monatoj je h 18.30. Buterpanoj mendeblas ĉe Ruth, tel.36466279, aŭ kunportu mem. Ekzistas multaj ekskurseblecoj kaj pli grandaj eventoj.

**Eventoj okazontaj:** La jarkunveno de DEA okazos en Aalborg 24-25-an de aprilo. La IFEF-kongreso okazos de la 7-a de majo en Sopron, Hungario. La SEF-jarkunveno okazos de la 19-a – 23-a de majo en Lesjöfors.

**Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de KEK, 23-an de februaro 2004**

Ĉeestis Jytte Sunekær, Arne Casper, Bent Wiinberg, Jens S. Larsen, Ole Blaust, Bent Jensenius, Ileana Schrøder kaj Ina Schultz.
**A.** Elekto de direktanto: Ole Blaust.
**B.** Elekto de protokolanto: Jens S. Larsen.
La direktanto konstatis ke la Ĝenerala Kunveno estis laŭstatute kunvokita.
Oni interkonsentis uzi la dissenditan tagordon prefere ol tiun de la statuto.
Oni voĉdonis por uzi Esperanton dum la Ĝenerala Kunveno.
**C**. Raporto de la prezidanto pri la agado dum 2004
Jytte voĉlegis la raporton, presitan en numero 1 (654) de Kontaktilo.
Oni okazigis unu-minutan silenton memore al la forpasintaj membroj Alfred Jørgensen el Lejre, Julie Hansen el Holbæk, kaj Ib Sunekær el Værløse.
La raporto estis akceptita.
**Ĉ.** La kasisto prezentas la kalkulaĵon por 2003 kaj la buĝeton por 2004.
Arne disdonis kopiojn de la bilanco kaj la buĝeto. Profito de ĉ. 2000 kr. en la bilanco ekestis nur pro eltirita obligacio
La bilanco estis akceptita.
Buĝeto: se la obligacioj ne estos eltiritaj, ni povos vendi ilin.
Kotizo: Ileana proponis altigon ĝis 180 kr. anstataŭ 150 kr. – La propono estis akceptita; tio do signifas 90 kr. por familianoj.
**D**. Proponoj (ili estu ĉe la prezidanto 10 tagojn antaŭe)
Neniu venis.
**E**. Elekto de 2 estraranoj por 2 jaroj (funkcias nun Arne Casper kaj Ole Blaust).
Arne plu funkcios; Bent Jensenius estis elektita anstataŭ Ole.
**F.** Elekto de 2 estraranaj anstataŭantoj por 1 jaro (funkcias nun Ana Røssum kaj Ileana Schrøder).
Ambaŭ daŭrigas.
**G.** Elekto de 1 revizoro por 2 jaroj kaj 1 por unu jaro.
Estis elektitaj Aleksander Kogan por 2 jaroj kaj Werner H. Madsen por unu jaro.
**Ĝ.** Elekto de 2 revizoraj anstataŭantoj por 1 jaro (funkcias Bodil Kühlmann).
Estis elektita Simon D. Petersen kaj reelektita Bodil.
**H.** Eventualaĵoj. (daŭrigo p. 4)

LA ESTRARO
Prezidanto kaj redaktoro
Jytte Sunekaer
Højlundshusene 16
3500 Værløse
Tel: 44 48 47 26
Jytte.Sunekaer@mail.tele.dk

Kasisto
Arne Casper
Bryggervangen 70, 4. tv
2100 København OE
Tel: 39 20 63 48
Mobilo: 21 40 84 87
Ĝirkonto 202-5558.
arne-casper@email.dk

Vicprezidanto
Bent Wiinberg
Naeldebjerg Allé 30
2670 Greve
Tel: 43 90 42 01
teo@post11.tele.dk

Sekretario
Jens S Larsen
C/o Trillingsgård
Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
Tel: 24 47 50 40
jens_s_larsen@yahoo.dk

Bent Jensenius
Højstrupvej 124
2700 Brønshøj
Tel: 38 60 15 86
bentjensenius@sol.dk.

Libroservo de DEA
Arne Casper

SOMEREKSKURSO KOPENHAGO:
10/7 ni promenos 'En la ŝpuroj de H.C.Andersen' tra Kopenhago kaj Amager. Ni kolektiĝos ĉe la ankro en Nyhavn. Kunportu lunĉpakaĵon kaj trinkaĵojn por propra konsumo.
Pliaj informoj poste.

**Kiel trovi Vasbygade 10**
Tiel vi trovu nin: Eliru la S-trajnon en Dybbølsbro stacio, transiru la ponton kaj dekstren, trapasu Otto Busses Vej, turnu dekstren tuj post la Shell-benzinujo

daŭrigo de paĝo 3

**Pri la biblioteko**

Jytte parolis pri la biblioteko kiun la klubo heredis de Gustav Kühlmann, kaj kiu nun troviĝas en la kelo de O. Blaust. Provizore la libroj povas tie resti senpage, sed kun duonjara aŭ simila averto povas fariĝi forigendaj. La biblioteko estas sufiĉe granda; siatempe Svend Friis-Jørgensen enkomputiligis la parton de la sliparo kiu komenciĝas per ”A”, kaj presite ĝi ampleksas 4 paĝojn.
La biblioteko delonge malaktivas; ĝi konsistas plejparte el malnovaj libroj, kaj nenio estis farita pri ĝi dum du jaroj. La biblioteko de RUC volonte akceptos ilin. Parto de la libroj estas tiel valoraj ke oni ne povas permesi hejmen-prunto de ili.
Ole atentigis ke laŭstatute la klubo devas havi bibliotekon. Li do proponis ke oni povus konservi la librojn kaj kunporti po 20 al la kunvenoj. Al tio Bent Wiinberg aldonis ke statute la biblioteko devas esti publika, kaj tia ĝi jam ne estas. Cetere laŭ la biblioteka regularo la kluba estraro decidas pri la vendo kaj fordonacado de libroj.
Konklude, do, tial kaj ĉar la punkto estis traktita sub “Eventualaĵoj” en la Ĝenerala Kunveno, la decido apartenas al la estraro.

## Kluba raporto:



26/1 Bjarke Nielsen voĉlegis el sia ampleksa kolekto pri la historio pri indianoj. Oni malbone kondutis al ili. Kelkaj el ni iam havis periferan kontakton kun tiu malgranda popolo. Ekestis dialogo.

9/2 Angla junulo en tre rava maniero rakontis pri sia tasko aktori en la instrua vidbendo *Pasporto al la tuta mondo*. Antaŭe li sin profundigis en volontula laboro ĉe UEA. Li ”bezonis” prepari sian adiaŭon tie. Gastis nin ankaŭ junulo el Portugalio. Li estis dungita de ”Amternes og Kommunernes Forskingsinstitut” por 14 tagoj. Estis interesa aŭskulti al liaj klarigoj pri sia E-rilato kaj lia laboro.

8/3 ”Kial mi fariĝis esperantisto” –ĉiu kun plezuro rakontis: Bent J., Ole kaj Eugeniusz: La ideo ŝajnis bona al ili. Zita kaj Henning: Ŝatas la lingvon kaj la kuneston. Lene: La bona etoso inter la esperantistoj. Uwe: Vivas en multlingva regiono kaj havas intereson pri lingvoj. Bjarke: Intereso pri la mondo kaj komuna lingvo. Bent W.: Scivolemo pri la simpla gramatiko. Jytte: Deziris esti inter gajaj homoj. Karen: *ne restis tempo por ŝia klarigo.*

# SUNDAJ JUNULOJ

**Nils Philips sendis invitilon pere de Anneli Nilsson**

Inbjudan till Konferensen "Framtidens Föreningsvillkor i Öresundsregionen"
lördag 15 maj, Parkens konferencecenter, Köpenhamn

Hur ser framtidens föreningar ut? Varför är det viktigt med demokrati och inflytande i föreningslivet?

På konferensen kommer dessa frågor besvaras! Öresundsprojektet FRIngo bjuder in alla föreningar och intresserade i regionen till en konferens med spännande föredrag, workshops och diskussionsforum på Parkens Konferencecenter i Köpenhamn.

Föredragshållare är den välkände danske fritidsforskaren Bjarne Ibsen och tidigare svenska utbildningsministern Bengt Göransson. Båda är inspirerande talare med mycken erfarenhet och kunskap om föreningslivet i Skandinavien.
Ni kan välja mellan tre workshops om föreningslivets framtida utmaningar:
Demokrati, öppenhet och inflytande i frivilliga organisationer, hur du kan få ungdomar engagerade i föreningen samt hur du tar tillvara på och kan använda föreningslivets goda historier.

Efter lunch är Demokratiakademin värdar för ett medryckande Dialogkafé där deltagarna öppet kan fundera kring dagens och framtidens villkor för regionens föreningsliv. Hur kan villkoren för samarbete förbättras? Vad kan vi lära av varandra och hur kan vi samverka bättre? Behövs det kanske en gemensam paraplyorganisation för regionens föreningar?
Konferensens debatter och diskussioner resulterar i en vitbok som efter sommaren landar på borden hos såväl politiker och tjänstemän som föreningar i regionen.

Konferensen är kostnadsfri och äger rum på en lördag - allt för att Ni som är aktiva i föreningar skall få möjlighet att medverka! Anmälan, program och ytterligare information på hemsidan www.oresund.com/fringo .
Program och inbjudan finns för nedladdning som pdf-fil här. (ca 2,3 MB)

Frågor och anmälan kan även ske till Föreningspilot Martin Lundgren på
telefon: 040-21 68 90 eller e-post: mlundgren@oresund.com . Martin skickar gärna en tryckt inbjudan till Er, om ni vill.

# ITV – TV på esperanto

Den 22 febr. lyssnade vi i  Köpenhamn på en mycket intressant presentation av idén att skapa **en TV-kanal via internet helt på esperanto**. Kanske låter detta ouppnåeligt för en rörelse som vår med begränsade ekonomiska resurser?

Flavio Rebelo, brasilianare, som är fast besluten att uppnå detta mål tydliggjorde för oss alla att detta ligger helt inom möjligheternas ram, om vi vill.
Den nya tekniken att sända över internet gör att kostnaderna för studio och teknisk utrustning blir en bråkdel av vad en normal TV-kanal betalar. Lönenivåerna i Brasilien är ytterst blygsamma samtidigt som kompetenta och engagerade människor finns beredda att genomföra projektet.



**ITV** -

Ett 20-tal medarbetare världen över har redan ställt sig till förfogande att redigera inslag från sin del av världen.

Programmen avser vara 4 tim långa och sändas i repris 6 gånger under dygnet.
Vi har ju inte dag och natt samtidigt över världen som bekant, men på detta sätt passar det alla  att se programmen.
Det är gratis för oss tittare att se dem och att från internet ladda ner dataprogram som behövs för att kunna titta.

**Tänk er vilken fördel för nybörjare som vill lära sig språket och den ökade prestige esperanto skulle få med helt esperantospråkiga program från en stor del av världen!**

Entusiasmen var stor under mötet och liksom danskarna stöder vi helhjärtat projektet!
Får Rebelo fram de nödvändiga ekonomiska resurserna kan ITV komma igång redan 2005.

Karin Lindquist och Sten Svenonius

# Kursoj kaj aranĝoj en Svedio kaj eksterlande

14.04 — 1.”La strukturo de la kultur-grupo KEKG”  -
2. ”Pri 14.04.1917- la mortotago de L.L. Zamenhof”
1. Prezento de Torben Svendsen
2. Prezento de Mogens Rude Andersen

La kulturgrupo KEKG invitas al interesa programo

19.5-23.5 — Sveda Esperanto-kongreso kun jarkunvenoj de SEF, SEJU, Eldona, kaj sveda ILEI-sekcio en Esperanto-gården



7.6-11.6 — Someraj Esperanto-kursoj en Popolaltlernejo en Oskarshamn


28.6-3.7 — Internaciaj Someraj Esperanto-kursoj en Lesjöfors

12.7-16.7 — Somera kurso en Knappekulla, Lerum

21.8-31.8 — Universala Esperanto Kongreso en Pekino, Ĉinio

25.08-29.8 — Europa Unia Esperanto-kongreso en Bilbao, Hispanio, vizitu la  kongres-paĝon por pliaj informoj:
www.geocities.com/esperantobilbao
.

3.9-5.9 — Semajnfina kurso por daŭrigantoj kaj retstudantoj.
Loko: Ruds-Vedby
(20 km. de Sorøen Selando).
La prezo, 350 dkr, inkluzivas ĉion.
Pli da informoj venontnumere!



Klubo Esperantista de Helsingborgo

## Bonan printempon al vi ĉiuj!

La tuta estraro kaj la revizoroj estis reelektitaj dum nia jarkunveno la 15-an de februaro. Ni decidis havi klubajn renkontiĝojn kiel kutime la trian dimanĉon krom dum la somero. Do, la datoj estas (notu en viaj kalendaroj) 18/4, 16/5, 15/8, 19/9, 17/10 kaj 21/11. Anstataŭ ordinaran renkontiĝon en junio ni faros ekskurson al Pålsjö por interalie viziti la tombon de nia Esperanto-pioniro G H Backman, kiu persone konis LL Zamenhof kaj kiu eldonis la unuan svedan lernolibron de La Internacia Lingvo. Vidu apartan inviton.

15 samideanoj el diversaj lokoj en Skanio kaj Danio venis por kune kun ni festi la 70-jaran jubileon de la nuna klubo. Ni elkore dankas pro la afablaj vortoj, la valoraj donacoj kaj la agrabla etoso!

**Invito ekskursi kun ni**

Aliloke Sten rakontas pri sia propono: ”Studrondo ĉirkaŭ la Sundo”. Kiam ni aŭdis pri ĝi dum la planadkunsido de SEA ni tuj ekŝatis la ideon. Kaj ĉar ni jam decidis ekskursi al Pålsjö ni ofertas tiun aranĝon kiel la unuan renkontiĝon kadre de la (eventuala) studrondo.

Ni kolektiĝos en la parkejo trans la strato de Pålsjöbaden (ĉe la marbordo norde de la centro de Helsingborg) je la 12-a horo dimanĉon la 13-an de junio 2004. Ni promenos supren tra la arbaro de Pålsjö, vizitos la akvomuelejon kaj la ĝardenon de la palaco, kaj pluiros al la junulargastejo/migrulhejmo Thalassa. Poste ni denove promenos tra la arbaro al la krematorio kaj la tombejo, kie ni fotos la tombon de Backman por sendi al la kolektantoj de t n Zeoj.

Ie dum la vojo ni haltos por manĝi nian kunportitan piknikon. Survoje reen al la parkejo eblas viziti la Pavilionon, kie oni meze de la arbaro povas trinki kafon kaj manĝi vaflojn.

Estas sufiĉe kruta vojo de la parkejo ĝis la palaco, eblas ankaŭ veturi tien per aŭto.

Se vi volas partopreni la ekskurson bonvolu sciigi nin, por ke ni neniun postlasu. Kunportu bonajn ŝuojn kaj piknikon.

Se vi volas kontribui al la studrondo ĉirkaŭ la Sundo per malgranda prelego pri iu koncerna temo vi estos pli ol bonvena. Nur sendu mesaĝon pri tio kaj ni enmetos ĝin en la programo por la tago. Ni rakontos pri la banejo, muelejo, palaco kaj aliaj partoj de Pålsjö, kaj pri Thalassa.

Mi mem estas tre entuziasma por la ideo pri studrondo, kie ĉiuj partoprenantoj kontribuas per prelegetoj pri diversaj aferoj. Povas esti vidindaĵoj, okazintaĵoj, interesaj personoj, moroj kaj tradicioj, sciindaĵoj .... io kaj ĉio pri nia regiono. Ni povas kolekti la tekstojn por uzi ankaŭ en aliaj kuntekstoj.

Ni edukiĝu kaj amuziĝu kune!

Ann-Louise



La Esperanto klubo de Lund

## Saluton LEK-anoj

Survojas la printempo, ĉu? El korespondaĵoj de francaj geamikoj jen pensoj pri la temo de Christiane Jagueneau, forme de t.n. miniaturo:

Ĉu eble LEK-anoj havas miniaturon en tirkesto? Aŭ, kial ne verki novan? (sekvendaj reguloj: precize 50 vortoj; la titolo tamen rajtas enhavi ĝis 15 vortoj)

**El la kluba agado:**

05.02 Estrarkunveno
12.02 Ordinara kunveno – gasto: Saba Javaheri
19.02 Renkontiĝo por novuloj: Krom Saba ĉeestis Dietmar Überbacher, studento el Tirolo. Kristina Takman kaj Daniel Granello parolis pri siaj esperantospertoj kaj A-M Lange prezentis LEK kaj studeblojn. La du junuloj ekstudis.

***Alvenas Printempo…***

*Grizaj flugadis la tagoj,*
*nigraj duondormis la tero kaj la nuboj,*
*malgajaj flugetis miaj pensoj*
*Eterne, ŝajnis daŭri la vintro!*
*Kaj, subite, bluiĝas la ĉielo,*
*roziĝas la persikarboj,*
*verdiĝas la kamparo.*
*La sep ĉielarkaj koloroj ĉie eksplodas,*
*ĝis interne de mia koro:*
*Alvenas Printempo sur la flugiloj*
*de sovaĝaj anseroj…*

11.03 Jarkunveno: Novelektita estis Ulla Saether kiel bibliotekisto. Ŝi proponis ke oni komputile registru ĉiujn heredaĵojn, kiujn LEK ricevis pasintjare (libroj, gazetoj k.s.) Ulla mem akceptis fari tiun laboron. Ni revenos al tiu temo.Por la ceteraj estrarpostenoj okazis reelektoj: La prezidanto reelektiĝis, tamen por unu jaro. Fine de la vespero ni ”profunde” konatiĝis kun Ulla Saether laŭ intervjuo el Svenska Kyrkan en Lund.
18.03 Okazis konversacia rondo – gvidis Granello.

Ne maltrafu la vesperon kun Ulla Saether, la 15-an de aprilo, 18.30 ĉe Sensus, kiam ŝi rakontos pri vizitoj en tri afrikaj landoj.

Belan printempon!

Anna Maria Lange

| | | |
|---|---|---|
| Lunde 12.04 | KEK/DEFA, Kph | Pro pasko neniu kunveno |
| Jaŭde 15.04 18.30 h | LEK, Lund | Ulla Saether: Vizitoj en tri afrikaj landoj |
| Sabate 17.04 16.00 h | KEM, Malmö | Printempa festo- vårfest ”Levu la rigardon ĉielen!” Prelego de Mogens Rude Andersen |
| Dimanĉe 18.04 | KEH, Helsingborg | Ni diskutas aktualajn temojn |
| Lunde 19.04 | KEK/DEFA, Kph | Rakontu pri iu vojaĝ-travivaĵo - eventuale kun kelkaj fotoj/bildoj. Daŭro maksimume 5 min. |
| Jaŭde 22.04 18.30 h | LEK, Lund | Konversacia rondo |
| Lunde 26.04 | KEK/DEFA, Kph | Pri la ĵus okazinta Dana Jarkunveno... |
| Merkrede 28.04 | KEM, Malmö | Kunportu objekton kaj rakontu pri ĝi! |
| Lunde 03.05 | KEK/DEFA, Kph | Kim (kaj ni) ludos, kantos kaj dancos... |
| Jaŭde 06.05 18.00 h | LEK, Lund | Venu por legi gazetojn |
| Lunde 10.05 | KEK/DEFA, Kph | IFK en Sopron - neniu kunveno |
| Merkrede 12.05 | KEM, Malmö | Ordinara kunsido. Tagordo paĝo 2 |
| Jaŭde 13.05 18.00 h | LEK, Lund | Konversacia rondo |
| Dimanĉe 16.05 | KEH, Helsingborg | Ni diskutas aktualajn temojn |
| Lunde 17.05 | KEK/DEFA, Kph | Pri la 56a IFK - partoprenintoj rakontos |
| Lunde 24.05 | KEK/DEFA, Kph | Jan informos pri la Interreto kaj niaj ebloj eluzi la avantaĝojn de ĝi - informserĉado, interparolo skribe kaj buŝe ktp. |
| Lunde 31.05 | KEK/DEFA, Kph | Pro pentekosto neniu kunveno |
| Lunde 07.06 | KEK/DEFA, Kph | Krucvortenigmoj kaj aliaj taskoj por du niveloj |
| Dimanĉe 13.06 13.00 h | **LEK, Lund** | Pikniko en Veberöd |
| Lunde 14.06 | KEK/DEFA, Kph | Ni spektos la filmon ”Balonfesto” (20 min.) - por la dua parto Lene ion preparis pri somerekskurso |
| Sabate 10.07 | KEK/DEFA | Promeno ”En la ŝpuroj de H.C. Andersen” tra Kopenhago kaj Amager. Pliaj informoj poste |

Informoj pri horoj kaj adresoj ktp. sur paĝo 8

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

### Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.

La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

### La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.

Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h. en la ejo de nia studorganizo SENSUS, Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange, Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt, allan.ljungstedt@telia.com

### Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.

La kunvenoj okazos je la 14-a horo en Faktorsgatan 5.
Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe Barbro Haraldsson tel. 042-121471

### Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.

Kunvenas en la ejo de DEFA. Vidu la informojn tie. Prezidanto: Jytte.Sunekaer@mail.tele.dk
tel. 0045-44 48 47 26

### Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG

Aranĝoj en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport, salono n-ro 1, dua etaĝo.
Pordoj malfermitaj 19.00-23.00. Ĉiu prelego okazos ĉ. 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al Torben Svendsen, Vanløse Alle 57, DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
rete: tsvendsen@webspeed.dk

### Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA

Kunvenas lundojn inter 19.30-22.00 en Banedanmark, entreprise, Vasabygade 10.
Por eniri: uzu la sonorilon ce la (krad)pordo.
Kontaktulo: Lene Niemann,
tel. 0045-49 26 13 19
Rete: niemann@mail.dk
Kluba retadreso: defakek@hotmail.com
retadreso

Hejmpaĝo de SEA:
**www.agado.net**
Respondeculo Johan Svenonius

## Dagens Nyheter (16.2.2004) pri lingvoproblemo en Europo

...Sed kun la demokrata rajto de ĉiuj landoj enskribi la propran lingvon en la konstitucio kiu gvidas Eŭropan Union, verŝajne la angla neniam estos akceptita kiel la komuna lingvo de la Unio. Pro tio restas la latina, aŭ eble Esperanto?
(de Christer Loernemark pere de mailo)

## Sukceso en Svedio

La transpreno fare de DSB, kune kun *Svenska Tågkompaniet,* de la trafikfunciado en la Roslagbanan apud Stokholmo en Svedio estas sukceso. La trajnoj estas laŭhoraraj je 95 % kaj la vojaĝantoj ĝenerale estas kontentaj pri la nuna trafiko.

## Multaj vizitis la retejo de SEF

La retejo de Sveda Esperanto-Federacio registris ankaŭ dum la jaro 2003 pli ol
1 milionon da vizitoj inter la 1.a de januaro kaj la 31-a de decembro ĝiaj paĝoj altiris ekzakte 1.050.877 vizitojn.
La paĝoj vekas ne nur scivolemon, sed ankaŭ konkretajn membriĝojn aŭ mendojn de lernolibroj de Esperanto

El Revuo Esperanto

## Nobelpremio!?

Por la kvina fojo EVA (Esperantlingva Verkista Asocio), proponis William Auld por la Nobelpremio 2004 pri literaturo

El Hirundo